

Januaro 2012

ESPERANTO-KURSOJ OFICIALE ORGANIZATAJ
EN UNIVERSITATOJ KAJ ALTINSTITUTOJ



kompilinto : **Germain PIRLOT**
Steenbakkersstraat 21
BE-8400 Oostende, Eŭropa Unio
gepir.apro.@pandora.be
07.01.2012

Antaŭparolo :

Karaj legantoj,

Antaŭ viaj okuloj troviĝas unu el la plej gravaj dokumentoj de la Esperanto-Movado: la raporto, kompilita kaj publikigita de Germain Pirlot, pri la oficiala nombro, tutmonda, de Esperanto-Kursoj ĉe la altlerneja kaj universitata niveloj. Kiam li komencis kompili tiun raporton en la jaro 1977, troviĝis tiutempe 58 universitataj kursoj de nia lingvo en 21 landoj. La nombro de landoj kaj de universitatoj variadis dum la lastaj pli ol 30 jaroj, atingante sian plej altan nivelon en 1987, kun 28 landoj kaj 125 kursoj. Ke ni revenu al tiu alta nivelo, kaj ke ni preterpasu ĝin!

La universitataj kursoj gravas laŭ multaj vidpunktoj. Unue, ili montras, ke Esperanto akceptiĝas en universitatoj kaj ke oni konsideras ĝin studinda temo. Due, tiuj kursoj valoras por altiri junulojn, esperantigi ilin, kaj tial doni pli da edukitaj lernantoj al nia komunumo. Trie, la profesoroj kiuj instruas tiujn kursojn estas ofte pagataj kiel ĉiuj aliaj profesoroj, kaj tio donas al Esperantistoj la ŝanĉon pli bone vivteni sin kaj dediĉi sin pli al Esperanto. Ankaŭ menciindas, ke tiuj kursoj permesas al niaj instruistoj verki materialon, eksperimenti kaj ĝenerale plibonigi siajn instruajn kapablojn. Kaj finfine, ni ne forgesu, ke tiuj statistikoj estas gravaj por niaj rilatoj kun neesperantistaj amaskomunikoj.

La rolo de statistiko en ĉiu sana organizo estas grava. Sen statistikoj, registaroj, firmaoj kaj neprofitcelaj organizoj, perdiĝos, ne sciante ĉu ili atingas aŭ ne atingas siajn celojn. Se ne ekzistas mezuriloj, ne nur estas malfacile prijuĝi rezultojn, ankaŭ estas malfacile motivigi individuojn al celstreba laboro. Parte en tio ankaŭ kuŝas la valoro de la raporto de Sinjoro Pirlot pri oficialaj kursoj.

Estas multe da statistikoj kiuj estas aŭ estos utilaj por la Esperanto-Movado. La nombro da homoj kiuj ĉeestas la Universalajn Kongresojn, ekzemple. La Esperanto-Movado

bezonas, tamen, multe da pli da statistikoj por helpi al ni kunordigin nian laboron kaj motivigi nin. Ni pensu ankaŭ pri statistikoj pri aperado de artikoloj pri Esperanto, laŭ lando, en amaskomunikiloj. La ekzemplo pri kiamaniere starigi sistemon por la bona kompilado de tiaj kaj aliaj valoraj statistikoj videblas en la sistemo kreita de Germain Pirlot.

Unue, li elektas gravan kategorion: la instruadon de Esperanto ĉe universitata nivelo. Due, li kompiladas la statistikojn utiligante plejparte la samajn kriteriojn jaron post jaro. Tio helpas al ni kompari rezultojn. Trie, li strebas al longdaŭra laboro, ĉar ĝuste en tiu longa tempo eblas eltiri konkludojn kaj poste labori por plibonigi por alĝustigi la agadomanieron kaj la rezultojn. La laboro fari tian laboron estas granda, kaj fakte tiel granda, ke li bezonas la subtenon de ni ĉiuj.

Pro la fakto, ke la laboro de Sinjoro Pirlot kaj de la statistikado en la Esperanto-Movado estas grava, valorus, ke ĉe la pinto de nia organizo, nia estraro utiligu tiujn informojn por komenci prijuĝi strategiojn. Estus bone, ke ĉe ĉiu Kongreso de Esperanto, tiu raporto estu menciata dum la plej grandaj kunvenoj por, ke ĉiuj sciu kaj por ke ĉiuj motiviĝu por partopreni en la kompilado de tiaj kaj de aliaj statistikoj, kaj por ke ĉiuj alstrebu fari farindindajn taskojn.

Menciindas, ke la posta starigo de sistemo por kompili statistikon ĉe www.edukado.net ankaŭ estas meritplena laboro, kaj baldaŭ eble vidiĝos maniero kunmeti la laboron de Germain Pirlot kun tiu de Katalin Kovats. Ĉiaokaze, ĉiam bezonatas pli kaj pli da atento ĉe la movadestroj pri tiaj statistikoj. La Estraro de UEA eble devas diri al ni ĉiuj, ke ili kredas, ke tiuj nombroj gravas, kaj ke la Estraro utiligos ilin por pli bone koni la nunan situacion kaj por pli bone plani nian futuron.

Dennis KEEFE



Enhavo :

- Oficiale en universitatoj kaj altinstitutoj p. 3
- Disvolviĝo 1977-2012 / grafikaĵo p. 17
- Sine de universitata asocio p. 18
- En universitatoj de la tria aĝo p. 18
- AIS / San Marino p. 20
- ISTK / Bydgoszcz p. 20
- Esperanto-Insulo / Esperanto-Universitato p. 21

Klarigoj de mallongigoj :

- (*) : informis la kursgvidanto mem
 - (°) : informis alia persono
 - a) univ. aŭ sup.inst. + adresoj, nacilingve laŭ latina alfabeto
 - b) kursgvid. + privata adresoj, poŝta kaj reta - /P/ la kursgvid. estas pagata
 - c) mallonga priskribo - h/sem : horoj/semajne - s. : sume.
- kun ekzameno, studunuoj, atestilo.

!!! [ret.@.adreso](#) :forigu la punkton antaŭ kaj post @

Nombro laŭlande : Brazilo : 5 - Bulgario : 1 - Ĉinio : 6 - Germanio : 3 - Hispanio : 1 - Hungario : 2 - Italio : 1 - Japanio : 5 - Korea Resp. : 3 - Kostariko : 1 - Kroatio : 1 - Litovio : 1 - Madagaskaro : 1 - Meksiko : 6 - Nederlando : 1 - Pollando : 6 - Rusio : 3 - Slovenio : 1 - Usono : 2
=> **sume : 50**
Landoj : 19

Brazilo

Alfenas (Minas Gerais) (*) :

- a)** Federala Universitato / Universidade Federal de Alfenas - Unifal-MG (Rua Gabriel Monteiro da Silva, 700, Centro, 37130-000, Alfenas, Minas Gerais, Brazilo).
- b)** S-ro Marcos COELHO BISSOLI (mbissoli@gmail.com) /P/ - S-ro Tiago CASTILHO ELIAS (tcastilho31@yahoo.com.br).
- c)** Baza kurso, kies celo estas kompreni, legi, skribi, paroli la lingvon ; 4 h/sem. Krome, semajne estas kunveno por paroli nacilingve i.a. pri la movado kaj la literaturo de Esperanto.

Campinas (São Paulo) (*) :

- a)** Ŝtata Universitato de Campinas (Campinas-SP-BR).
- b)** Prof. Jozefo LUNAZZI (UNICAMP / Instituto de Física, Rua Sergio Buarque de Holanda, 777, Cidade Universitária "Zeferino Vaz" –Campinas – SP BR-13083-859 – lunazzi@ifi.unicamp.br) - S-ro Rafael Henrique ZERBETTO (rzerbetto@gmail.com).
- c)** Nedevisa ; 2 h/sem, s. 30 h. Por studentoj el ĉiuj Fakultatoj; sed iu ajn persono povas ankaŭ partopreni.

Kun poento por la studentoj, proporcia al la kvanto da horoj/semajne.
Kun du ekzamenoj kaj diplomo de la loka Kultura Centro de Esperanto.

Curitiba (Paraná) (*) :

a) Federacia Universitato de Paranao (UFPR).

b) Prof. D-ro Ivan Eidt COLLING (iecolling@yahoo.com.br) - S-ro Matheus ARTIOLI FIRMINO (kuracisto@hotmail.com) – S-ro Thiago MACHADO DA SILVA (thiagomachado86@gmail.com).

c) Temas pri kursoj de CELIN (Centro pri Lingvoj kaj Interkulturo - www.celin.ufpr.br), kiu estas programo de por-komunuma agado de la Universitato ("por-komunuma" signifas, ke ĝi celas ne nur la internan universitatan publikon, sed ankaŭ la eksteran).

Diversaj E-kursoj ; 30 horoj dum tri semajnoj.

Fortaleza (Ceará) (*) :

a) Federacia Universitato de Cearao (Caixa Postal 12196, CEP 60020-970 – CE – Brazilo).

b) Prof. José LEITE DE OLIVEIRA Junior (Caixa Postal 12196, CEP 60020-970 – CE Brazilo – esperanto@ufc.br) /P/.

Krom la kunordiganto, gvidas kursojn ankaŭ : S-ro Adelson SOBRINHO (Univ. Instruisto, /P/), S-ro Paulo Sérgio FERNANDES FELIX (studento, kun stipendio), S-ro José Roberto ALVES ALBURQUERQUE.

c) Kadre de la Ĝeneralaj Fremdaj Kulturaj Domoj. Temas pri malfermita kurso al la publiko ekster la universitato, tamen ĝi rajtigas al la studentoj kalkuli ĝin kiel kromajn stud-kreditojn. Ĉiusemestre malfermiĝas enskriboj por la 60-hora klasĉambra aŭ reta kursoj; ambaŭ oficialaj kaj nur la reta tute senpaga. Eblas kursi de unu ĝis kvar semestroj. La reta kurso havas unusemestran elementan 60-a kurso kaj unusemestran kurson pri diverstemaj tekstoj (teknikaj, sciencaj, folozofiaj, religiaj kaj ĵurnalismaj).

Por ricevi semestran atestilon, la lernant(in)o devas ĉeesti minimume 75% el la 60 horoj kaj atingi almenaŭ 50% el poentoj de la ekzamenoj.

Informoj kaj matrikuloj: esperanto@ufc.br - informpaĝo: www.esperanto.ufc.br

Vitória (*) :

a) Federacia Universitato de la Ŝtato Sankta Spirito (Universidade Federal do Espírito Santo) / UFES (Avenida Fernando Ferrari, s/nº, Campus de Goiabeiras, Vitória, ES; www.ufes.br).

b) Prof. Dr. Wilson ARAGÃO FILHO (esperantovix@yahoo.com.br); S-ro Márcio MALACARNE (marcio.malacarne@gmail.com).

c) Baza kurso inter aprilo kaj junio, per lernomaterialo verkita de Prof. Dr. Wilson ARAGÃO FILHO kaj aliaj ekzercoj. Okazas mez-nivela kurso inter septembro kaj novembro, se la gelernantoj de baza kurso volas daŭrigi la studadon; se ili ne volas, okazas nova baza kurso dum tiuj monatoj. La lernantoj ankaŭ ricevas KDon, plena de utilaj arkivoj kaj muzikoj. Dum du monatoj, 4 h/sem. Legado, skribado, parolado kaj hejmekzercoj estas praktikataj en ĉiu leciono. Post la kurso, la instruistoj renkontiĝas por elekti tiujn, kiujn bone lernis kaj povas ricevi diplomon.

Bulgario

Karlovo (*) :

a) Internacia Universitato (BG-4300 Karlovo, p.k. 44).

b) Prof. Bojidar LEONOV (BG-4300 Karlovo, p.k. 44 leonov@rozabg.com).

c) Esperanto estas deviga studlingvo en la programo de la studado; s.240 h. La studado povas esti rete aŭ ĉeeste.

Bazaj studfakoj kaj fakoj por specialiĝo estas turismiko.ekonomiko kaj gvidado de turismaj firmaoj, eŭrologio, komerco, ĵurnalistiko, administrado, librotenado, informadiko. Kromaj studadfakoj kaj fakoj port specialiĝo estas : komputila tekniko, internacia patenta juro, scienc-teknika informado, turisma animacio, organizado kaj gvidado de hoteloj kaj restoracioj, ekskursgvidado. En le studprogramo estas apartaj kursoj pri interlingvistiko, historio de E-movado, E-literaturo kaj kulturo.

La studentoj partoprenas diversajn studadsesiojn de AIS en Bulgario kaj eksterlande.

Post la sukcesa fino de la studado, la studentoj ricevas AIS- Diplomon por Bakalaŭro kaj Magistro.

Krom tio, surbaze de ŝtata licenco de la Nacia Agentejo por profesia edukado, la studentoj povus aldone ricevi ŝtate agnoskitajn dokumentojn por la 10 profesioj menciitaj supre.

Ĉinio

Baotou (Interna Mongolio) (*) :

a) Scienca kaj Teknika Universitato de Interna Mongolio / Neimengu Keji Daxue (Baotou-shi Aerding Dajie 7-hao, Baotou, CN-014010, Baotou, Neimenggu).

b) S-ro LIU Baoguo (verdakoro@yahoo.com.cn) – S-ro MA Jianming.

c) Nedevisa; 4 h/sem; s.32 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

Nanchang (Jiangxi) (°) :

a) Nanchang Universitato / Nanchang Daxue (Nanchang-shi, Honggutan-xinqu, Xuefudadao-99hao, CN-330031).

b) Prof-ino. GONG Xiaofeng (Nanchang-shi, Honggutan-xinqu, Xuefudadao-99hao, CN-330031 - arko.gong@qq.com) ; s-ro XIAO Neiyuan.

c) Nedevisa. 3h/sem, s. 32h. Kun taksio kaj 2 studunuoj.

Nanjing (Jiangsu) (*) :

a) Nanjing Universitato / Nanjing Daxue (Nanjing-shi, Nanjing Daxue, CN-2100093, Nanjing, Jiangsu).

b) S-ro Dennis KEEFE (keefeinchina@gmail.com) - S-ro XIAO Neiyuan .

c) Nedevisa. 4h/sem, s. 64 h. Kun ekzameno kaj 2 poentoj.

Shenyang (Liaoning) (°) :

- a)** Liaoning Universitato / Liaoning Daxue (Shenyang-shi Chongshanzhonglu-66hao, Huanggu-qu, Shenyang, CN-110036, Shenyang, Liaoning).
- b-1) :** Prof-ino JIAO Xiyang (Shenyang-shi Lingkong Erjie, 55hao, 231shi, Tiexi-qu, Shenyang, CN-110022, Shenyang, Liaoning - stela99.@.sina.com) /P/;
2. Prof-ino LI Yanhong (Shenyang-shi Chongshanzhonglu, 66hao, Huanggu-qu, Shenyang, CN-110036, Shenyang, Liaoning) /P/.
- c-1)** Nedevisa. 4 h/sem, s. 60h. Kun ekzamenoj kaj 4 studunuoj.
- b-2) :** D-ro ZHAO Xu (Chongshanzhonglu-66hao, Huanggu-qu, Shenyang, CN-110036, Shenyang, Liaoning) /P/.
- c)** Kurso de evolua historio de Esperanto. Nedevisa. 2 h/sem, s. 30. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

Xinxiang (Henan) (*) :

- a)** Xinxiang Universitato / Xinxiang Xueyuan (Xinxiang-shi, Jinshui Dadao, CN-453003, Xinxiang, Henan).
- b)** S-ro WANG Xiaosi; S-ino JIA Rongxia (xibeibona.@.163.com).
- c)** Nedevisa. 2/sem, s.26 h. Kun ekzamenoj (skriba kaj parola) kaj 2 studunuoj.

Zaozhuang (Shandong) (*) :

- a)** Zaozhuang-a Universitato (Zaozhuang Xueyuan Guoji Xueyuan, CN-277100 Shandong).
- b)** S-ro SUN Mingxiao (semio @.163.com).
- c)** Nedevisa, por studentoj el diversaj fakultatoj; sume 36 h. Kun 2 poentoj post sukcesa ekzameno.

(*Landa informanto* (°) : s-ro WU Guojiang amikeco999.@.21cn.com)

Germanio

Emden (*) :

- a)** Altlernejo / Hochschule Emden-Leer (Constantiaplatz 4, DE-26723 Emden – www.hs-empden-leer.de).
- b)** S-ro Sebastian KIRF (Dodo-Wildvang-Straße 4, DE-26723 Emden – sebastian.kirf.@.hs-empden-leer.de - <http://hs.kurso.info> - <http://esperanto-empden.de>) /P/.
- c)** Elektbla lingvokurso (por plenumi la devigan lingvokurson unusemestran -> 3 studpoentoj) aŭ elektofako (-> 2 studpoentoj) por la studentoj de la Fakultato “Socia laboro kaj saneco”. Baza kurso : 15 x 1,5 h/sem. (sume : 22,5 h). Miksitaj lernelementoj, la bazo estas la libro “Esperanto direkt”, el kiu estas tralaborata ĉ. la 10-15 unuaj lecionoj. La kurso okazos parte per hejma komputilo. Kun skriba finekzameno kaj studpoentoj. Validas por plenumi la necesajn ĝeneralajn studhorojn.

Münster (*) :

- a)** Universitato, Instituto por Ĝenerala Lingvistiko / Universität Münster, Institut für Allgemeine Sprachwissenschaft (Aegidiistr. 5, DE-48149 Münster).
- b)** D-ro D-ro Rudolf FISCHER (Gustav-Adolf-Str. 2a, DE-48356 Nordwalde, fischru.@uni-muenster.de) kun oficiala instrukomiso por Esperanto ekde la somera semestro de 2009 (post pensiuliĝo). /P/.
- c)** Vintra semestro 2011/12. Fakultata, por komencantoj ; 2 h/sem. Fina ekzameno A2, 5 studpoentoj. Kun 2 studunuoj.

Stuttgart (*) :

- a)** Universitato / Stuttgart Sprachenzentrum (Th. Heuss-Str. 2A, EG, R. 065, DE-70174 Stuttgart).
- b)** Kursgvidanto: D-ro Johannes MULLER (johannes-mueller.@web.de).
- c)** 2 h/ sem. Dum vintra semestro.

Hispanio

La Laguna (Tenerifo, Kanariaj Insuloj) (*) :

- a)** Universitato de La Laguna, Departamento de angla kaj germana filologio <http://www.ull.es> (Universidad de La Laguna, Departamento de Filología Inglesa y Alemana, Campus de Guajara, ES-38071 La Laguna).
- b)** Prof. Alejandro LOPEZ DE VERGARA M (aflopez.@ull.es - <http://webpages.ull.es/users/aflopez/esp/index.htm>)
- c)** Libervola seminario por la universitata komunumo ĉe la Fakultato pri Filologio : « Enkonduka Seminario pri Esperanto kaj ĝia kulturo » (Seminario de Introducción al Esperanto y su Cultura) ; sume 30 h. La Esperantista Societo de Tenerifo, kutime ankaŭ kunlaboras per kvar prelegantoj dum la kurso - <http://webpages.ull.es/users/aflopez/esperanto/> Kun 3 kreditunuoj.

Hungario

Nyíregyháza (*) :

- a)** Altlerneja Lingvolernejo « Students Stop ! » (HU-4400Nyíregyháza, Sóstói u.31/B).
- b)** S-ino Enikő ZENGŐ SEREGHY (HU-4400. Nyíregyháza, Dózsa Gy. u-14.2/8 - enimyster.@gmail.com).
- c)** Trimonata kurso, dufoje 4 lecionoj semajne ; sume 100 h. Post la fino de la kurso la studentoj decidis laŭ mia propono, ĉu ekzameniĝos pri la lingvo, aŭ ili plu lernas dum ĉ. unu monato.
- La gestudentoj faras ekzamenon, por ricevi siajn diplomojn en la Altlernejo. Ili faras ŝtatan lingvoekzamenon en meznivelo en pli granda procento.

Szeged (*) :

- a)** Universitato de Szeged, Pedagogia Fakultato Juhasz Gyula, Andragogia Instituto (HU-

6723 Szeged, Szilleri sgt. 12).

b) Dr-ino Edit UJVARI Ph.D (HU-6723 Szeged, Szigony u. 36. ued.@jgypk.u-szeged.hu)
Petra SMIDÉLIUSZ (p.smideliusz@gmail.com), Ildikó Joóné LADÁNYI
(ladanyi.ildiko.t-online.hu) /P/.

c) Deviga, unu studjara, oficiala universitata kursaro (25 kreditoj) en la tria bakalaŭra studjaro de la Andragogia Fakoj por kiuj elektis tiun specialan kursaron.

La studobjektoj: 8 h/sem. Esperanto lingvokurso, historio, movado, kulturo, organizoj kaj aplikadoj de Esperanto; 4 h/sem. fakaj studobjektoj hungare: program-organizado, marketingo, manaĝer-studadoj.

Italio

Torino (*) :

a) Universitato de Torino, Beletro kaj Filozofia Fakultato. Lecionoj ĉe "Palazzo Nuovo" (Via Sant'Ottavio 20, Torino).

b) D-ro Federico GOBBO (federico.gobbo@unito.it).

c) "Lingvoplanado kaj planlingvoj". Nedeviga, malfermita al magistras studentoj de lingvistiko, filozofio, historio, literaturo, komparaj kulturoj. Malfermita en la akademia jaro 2011-12, la kurso estas entute 36-hora (6 h/sem): ĉiun lecionon la unuaj du horoj pri interlingvistiko, eŭropa lingvo-politiko kaj lingvo-planado; la tria pri Esperanto.

Kun ekzameno kaj kun 6 kreditunuoj.

Retpaĝo de la kurso: <http://www.lettere.unito.it/do/corsi.pl/Show?id=9ade;sort=DEFAULT;search=:hits=481> .

Japanio

Minoo (Osaka-hu) (*) :

a) Osaka Universitato, Fremdlingva Fakultato / Osaka Daigaku, Gaikokugogakubu (Aomatani-Higasi 8-1-1, JP-561-8558 Minoo).

b) S-ro TANI Hiroyuki (Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561-0831 Toyonaka; tnhryk@pop07.odn.ne.jp) /P/.

c) Nedeviga, unujara lingvokurso, 1 ½ h/sem., s. 45 horoj jare.

Kun ekzameno kaj studunuoj.

Saitama (*) :

a) Universitato Saitama / Saitama Daigaku (255 Shimookubo, Sakura-ku, Saitama-si, Saitama-ken).

b) Prof. SASAKI Teruhiro (steruhiro@hotmail.co.jp).

c) Nedeviga, 90-minutoj/sem., 15 fojojn. duonjaro.

Kun poentoj.

Tôkyô (*) :

- a) Tokia Instituto de Teknologio / Tokio Kougyou Daigaku (ĉambro W 832, konstruaĵo W 8, 2-12-1 Ookayama, Meguru-ku, Tokyo, 152-8550 - <http://groups.google.com/group//tokoda>).
- b) Prof. SASAKI Teruhiro (steruhiro@hotmail.co.jp).
- c) Nedevisa. Ekde aprilo ĝis julio kaj ekde oktobro ĝis februaro; 90 minutoj/semajne. Kun poentoj.

Tôkyô (*) :

- a) Elsenda Universitato / Housou Daigaku, ĉe filio Oomija.
- b) Prof. SASAKI Teruhiro (steruhiro@hotmail.co.jp).
- c) Nedevisa; fundamenra gramatiko. Koncentrita lekcio : 80 min. x 8 fojoj. Kun poentoj.

Tôkyô (*) :

- a) Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj / Tokyo Gaikokugo Daigaku (3-11-1, Asahi-cho, Fuchu-shi, Tôkyô, JP-183-8534).
- b) Prof. GOTOO Hitosi (gothit@sal.tohoku.ac.jp ; [URL:http://www.sal.tohoku.ac.jp/~gothit/](http://www.sal.tohoku.ac.jp/~gothit/)) /P/.
- c) Nedevisa, duonjara; intensiva kurso dum semajno; sume 30 horoj.

Kongo Dem.Resp.

Rutshuru (Nord-Kivu) () :

- a) Universitato de la Grandaj Lagoj / Université des Grands Lacs (Rutshuru, Nord-Kivu).
- b) Useni Kalumbi RADJAB (P.O.Box 40, Bunagana/Kisoro, Ugando – useniradjabu@yahoo.fr) /P/.
- c) Fakultato de Sciencoj pri Informado kaj Komunikado; 30 h/jare.

Korea Resp.

Iksan (*) :

- a) Universitato Wonkwang, (344-2 Shinyong-dong, Iksan, Chonbuk, KR-570-749).
- b) Doc. LEE Jung-kee esperanto@saluton.net) /P/.
- c) Libere elektebla; 2 h/sem. dum 16 semajnoj. Kun 2 poentoj semestre, kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio..

Jukjeon/Chonan (*) :

- a) Universitato Dankook (44-1 Jukjeon-dong, Yongin-si, Gyeonggi-do).
Unu klaso en Jukjeon kaj du klasoj en Chonan.
- b) Doc. LEE Jung-kee en Seoul (esperanto.@saluton.net) /P/.
- c) Libere elektebla; 2 h/sem dum 16 semajnoj.
Kun 2 poentoj semestre; kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

Seoul/Yongin (*) :

- a) Universitato Korea Fremdlingva (270 Imun-dong, Dongdaemun-gu, Seoul, kaj Yongin po unu klaso).
- b) Prof. LEE Young-koo por kurso en Seoul kaj Yongin (ykli.@hufs.ac.kr) /P/.
- c) Libere elektebla; 2 h/sem dum 16 semajnoj.
Kun 2 poentoj semestre; kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

Kostariko

San José (*) :

- a) Universitato de Kostariko, Fakultato de Filologio, Lingvistko kaj Literaturo / Universidad de Costa Rica, Escuela de Filología, Lingüística y Literatura (San Pedro de Montes de Oca, San José).
- b) Prof. Hugo MORA-POLTRONIERI (Apartado 606, 1250 Escazú, Kostariko, miaumiau.@ice.co.cr).
- c) Estas programita baza, liberelektebla E-kurso
- *ĉu* somerkurso (jan-feb. 2012) por studentoj en ĉiuj bakalaŭraj karieroj. Temas pri la ĉiujjara, oficiala, elektebla, baza E-kurso;
Kun tri akademias poentoj aŭ kreditunuoj.
- *ĉu* baza E-kurso dum la unua semestro 2012 (mar-jun.); alirebla por ĉiuj interesiĝintoj sen akademias kondiĉoj. Pagenda.
Kun diplomo.
Rim. : eblas organizi nur unu el la du !

Kroatio

Zagreb (*) :

- a) Germana fako, Filozofia fakultato, Universitato de Zagrebo / Odsjek za njemački jezik, Filozofski fakultet Sveučilišta u Zagrebu (Ivana Lučića 3, HR-10000 Zagreb)
- b) Dr-o Velimir PIŠKOREC, orda profesoro (Palmoćeva 29a, HR-10000 Zagreb; vpiskor.@ffzg.hr)
- c) Esperanto por komencantoj kadre de du nedevigaj interlingvistikaj studobjektoj: *Planlingvoj* (por studentoj de Germana fako, germanlingve, vintra semestro, 2 h/sem., entute 26 h.; uzata la germanlingva eldono de la lernolibro laŭ Zagreba metodo; 2 kreditoj) kaj *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto* (por studentoj de Filozofia fakultato kiuj ne studas la germanan lingvon; kroatlingve, somera semestro, 2h/sem., entute 26 h.; uzata la kroatlingva eldono laŭ Zagreba metodo; 3 kreditunuoj).

Kroatlingva prikribo de studobjektoj en la reto:

Planlingvoj

http://www.ffzg.unizg.hr/german/cms/index.php?option=com_content&task=view&id=94&Itemid=1

Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto

http://www.ffzg.unizg.hr/german/cms/index.php?option=com_content&task=view&id=799&Itemid=1

Litovio

Šiauliai (*) :

a) Šiauliai Universitato (str Vilniaus 88, LT-76285 Šiauliai).

1) :

b) Prof. Aloyzas GUDAVIČIUS (Žeimių 2a-12, Ginkūnai, Šiaulių raj;
gudavicius.@hu.su.lt).

c) Interlingvistika kurso; 2 h/sem, s. 32 h; dum semestro.

Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

2) :

b) S-ro Zenonas SABALYS (Dvaro 111, LT-76210 Šiauliai zenonas.sabalys.@takas.lt).

c) Elektbla Esperanto-kurso; dum 1 semestro; 2 h/sem. s. 32 h.

Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

Madagaskaro

Antananarivo (*)

a) Campus Universitaire d'Ambohitsiana, B.P. 566 MG-101 Antananarivo, Madagaskaro.

b) RABEVAZAHA Désiré (B.P. 3171, MG-101 Antananarivo –
desire_rabevazaha.@yahoo.fr).

c) Laŭ permeso de la ministerio pri nacia edukado ekde 1995 ĉe beletra fakultato. 4/h/sem, sume : 80h. Kun dunivela ekzameno kaj diplomo « Atesto pri lernado » kaj « Atesto pri praktika lernado ».

Meksiko

Aguascalientes (*) :

a) Aŭtonoma Universitato de Aguascalientes, Integrala kaj homaranisma formado / Universidad Autónoma de Aguascalientes / Formación Integral (Formación Humanista)

(http://www.uaa.mx/direcciones/dgdp/dafi/formacion_humanista.html)

(http://www.uaa.mx/direcciones/dgdp/dafi/descargas/cursos_FI_2011.pdf)

- b)** Prof. Vicente VALDÉS BEJARANO (wbejaranomx@hotmail.com)
c) Intensiva kurso : 35 h, ĉiutage dum unu monato (dum universitata ferio) - Ordinara kursoj : 2 h ĉiusabate dum unu semestro. Krome en la Universitato estas tri konversaciaj kluboj, kiuj kunvenas ĉiusemajne kun specifaj programoj pri teatro kaj literaturo en Esperanto.
Kun tri poentoj.

Mexicali (*) :

- a)** Universitato / Universidad Autónoma de Baja California, UABC (Ave. Monclova s/n Ex Ejido Coahuila, C.P. 21360 Mexicali, Baja California, México).
b) S-rino Gilda MUÑOZ BONILLA (gildamunoz.live.com).
c) Elektbla somera aŭ vintra kurso por studentoj de la Fakultato pri lingvoj por tradukado kaj lingvo-instruado. Baza, inter A1 kaj A2 ; 4 h/tage ; sume 68 h.
Kun ekzameno kaj kreditunuoj.

México (*) :

- a)** Nacia Aŭtonoma Universitato de México, Jura Fakultato / Universidad nacional Autónoma de México, UNAM (www.unam.mx).
b) Lic. Luis CÓRDOVA ARELLANO (luisesperanto@yahoo.com).
c) Sabate, 3 h, 6 kurssesioj.
Informo ĉe : www.cordovaluis.org

Querétaro (*) :

- a)** Aŭtonoma Universitato de Querétaro, Fakultato pri lingvoj kaj beletroj, ([Anillo Vial, Fray junípero Serra, sin número](#))
b) – Doc. Carlos FERNANDO HERNÁNDEZ (Arco del Triunfo 2019-40 poŝta kodo 76148, cfhl.esperetaro@gmail.com) /P/.
- Prof. Sergio ROMERO ALDANA (sangtrinkulo@gmail.com) /P/.
c) Estas tri bazaj kursoj ; du intersemajnaj kaj unu sabata ; 3 h/sem. ; s. 36 h.
Laŭ pluraj lernolibroj ; celo estas instrui ne nur pri la uzo de la lingvo, sed ankaŭ pri la kulturo kaj historio de Esperanto
Por testi la kurson estos neoficiala ekzameno je la nivelo A2, poste la volantaj gelernantoj faros oficialan ekzamenon.

Texcoco (°) :

- a)** Universidad Autónoma Chapingo. km 38.5 carr. México - Texcoco. CP 56230, Chapingo, Texcoco, Estado de México.
b) S-ro Víctor Iván SOMBRA ARGÜELLES. (reta kontakto tra MEF: www.esperanto-mexico.org - Cel. 552 802 11 83
c) Libervola kurso por komencantoj dum 13 semajnoj, 2h/sem (entute 25 h).

Tijuana (*) :

- a)** Universitato / Universidad Autónoma de Baja California, UABC (Calzada Universidad 14418, Parque Industrial Internacional Tijuana, C.P. 22390 B.C., México).
b) S-rino Gilda MUÑOZ BONILLA (gildamunoz.live.com).

c) Elektbla kurso por studentoj de la Fakultato pri lingvoj por tradukado kaj lingvo-instruado. Baza, inter A1 kaj A2 ; 4 h/sem. ; sume 68 h.
Kun ekzameno kaj kreditunuoj.

Nederlando

Amsterdam (*) :

a) Universitato / Universiteit van Amsterdam (Theoretische Taalwetenschap, Spuistraat 210, NL-1012 VT Amsterdam).

b) D-ro Wim JANSEN (Emmaplein 17A, NL-2225 BK Katwijk wimjansen.@.casema.nl ; hejme) kaj w.h.jansen.@.uva.nl (en la universitato). /P de eksteruniversitata fondaĵo/.

c) Katedro pri “Interlingvistiko kaj Esperanto”. – Du fakoj estas elektblaj por studentoj prefere ĉirkaŭ la bakalaŭra nivelo (tria jaro).

1) Nomo kaj priskribo de la unua fako (funkcianta de 2002) : “interlingvistiko”, kiu donas ĝeneralan komprenon pri la internacia lingvoproblemo kaj pri planlingvaj solvoproponoj en ilia historia, sociologia kaj lingvistika kunteksto. Ĝi estas studata el pluraj perspektivoj. Krome, estas pristudataj pli profunde kelkaj modernaj lingvomodeloj. Pri la ekzempla lingvo Esperanto estas konsiderataj aspektoj kiel la tipologio, la funkciado, natureco kontraŭ skemeco, spontanaj evoluoj, literaturo, k.s.

Dum 3 monatoj, 3 h/sem. (s. 42 h, lekcioj).

La fina prijuĝo kun poentaro inter 1 (malbona) kaj 10 (perfekta) okazas surbaze de la averaĝa prijuĝo de la hejmtaskoj kaj la ekzamena rezulto. La kredito estas 10-punkta laŭ la Eŭropa ECTS-sistemo.

2) Nomo kaj priskribo de la dua fako (funkcianta de 2006): “Esperanto”, kiu donas lingvokurson kovrantan la bazajn gramatikon kaj leksikon de la lingvo. Krome estas studataj kelkaj specifaj trajtoj de la Esperanto-gramatiko el ĝenerallingvistika vidpunkto.

Dum 3 monatoj, 3 h/sem. (s. 42 h, lekcioj).

La fina prijuĝo kun poentaro inter 1 (malbona) kaj 10 (perfekta) okazas surbaze de la averaĝa prijuĝo de kvar laŭsemestraj ekzamenoj. La kredito estas 10-punkta laŭ la Eŭropa ECTS-sistemo.

La fakultato rekonas la ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto kiel oficialan stagejon por studento(j). Ĉiujare studentoj estas invitataj konkurse prezenti esplortemon, kies venkanta aŭtoro(j) gajnas unusemajnan staĝon dum la UK financatan de eksteruniversitataj fontoj privataj kaj instituciaj. Aprobata esplorraporto donas krediton de (po) 5 poentoj al la studento(j).

Pollando

Biała Podlaska (*) :

a) Supera Lernejo / Państwowa Szkoła (Wyższa im. Jana Pawła II, ul. Sidorska 95/97, Biała).

b) D-rino Dorota MAĆZKA (maczdoro11.@.interia.pl).

c) Elementa kurso; nedeviga; 1 h/sem.
Kun skriba ekzameno.

Kraków (*) :

a) Jagelona Universitato (ul. Gołębia 24, PL- Kraków).

b) Mag-ino Maria MAJERCZAK (Kraków, [mmajerczak.@.gmai](mailto:mmajerczak@gmail.com)) /P/.

c) Deviga, post elekto. Nomo de la kurso: "Esperanto - lingvo kaj kulturo". Bazgrada kurso. Elektebla : 1) kiel lingvo ; 2) kiel scienca studobjekto, kun elementoj de lingvistikaj teorioj, E-historio, kulturo k.a.

60 h, dusemestra, 2 h/sem.

Kun skriba kaj parola ekzamenoj. Por la studentoj, kiuj lernas ĝin kadre de sia deviga studprogramo: pritakso, ECTS-poentoj, konfirmo en la oficiala studlibreto kaj en la ekzamena registro.

Por ĉiuj – Atestilo [Certyfikat] pri Esperanto de Jagelona Universitato. Tiu atestilo ĝuas altan prestiĝon.

Kraków (*) :

a) Jagelona Universitato (ul. Gołębia 24, PL- Kraków).

b) Mag-ino Maria MAJERCZAK (Kraków, [mmajerczak.@.gmai](mailto:mmajerczak@gmail.com)) /P/.

c) Deviga, post elekto. Nomo de la kurso: "Esperanto - lingvo kaj kulturo". Mezgrada kurso. Elektebla : 1) kiel lingvo ; 2) kiel scienca studobjekto, kun elementoj de lingvistikaj teorioj, E-historio, kulturo k.a.

60 h, dusemestra, 2 h/sem.

Kun skriba kaj parola ekzamenoj. Por la studentoj, kiuj lernas ĝin kadre de sia deviga studprogramo: pritakso, ECTS-poentoj, konfirmo en la oficiala studlibreto kaj en la ekzamena registro.

Por ĉiuj – Atestilo [Certyfikat] pri Esperanto de Jagelona Universitato.

Kraków (*) :

a) Akademia Górniczo-Hutnicza (al. Mickiewicza 30, PL- Kraków).

b) Mag-ino Maria MAJERCZAK (Kraków, [mmajerczak.@.gmai](mailto:mmajerczak@gmail.com)) /P/.

c) Elektebla, nedeviga. Nomo de la kurso: "Esperanto - lingvo kaj kulturo". Bazgrada kurso. 60 h, dusemestra, 2 h/sem.

Kun skriba kaj parola ekzamenoj (fakultat.). Konfirmilo. Eblas ekzameniĝi en Jagelona Universitato por akiri ĝian atestilon [Certyfikat] pri Esperanto.

Poznan (*) :

a) Universitato Adam Mickiewicz, Instituto pri Lingvistiko (al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan).

b) Prof. Dr hab. Ilona KOUTNY ([ikoutny.@.amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)) ; mag. Michael FARRIS ([maf.@.amu.edu.pl](mailto:maf@amu.edu.pl)).

c) Tutjara ĉiusemajna kurso (60 horoj) en la angla: "*International communication - international languages*" por la tagaj gestudentoj de la Lingvistika Instituto kun partopreno de eksterlandanoj enkadre de Erasmus-programo.

Temoj : <http://intlangu.blogspot.com/2011/10/class-topics.html> .

Poznan (*) :

- a)** Universitato Adam Mickiewicz, Instituto pri Lingvistiko (al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan).
- b)** Prof. Dr hab. Ilona KOUTNY (ikoutny@amu.edu.pl) ; prelegantoj en 2011/12: prof. Vera BARANDOVSKA-FRANK (interlingvistiko), prof. Aleksander MELNIKOV (esperanta kulturo), prof. John WELLS (fonetiko), Lidia LIGĘZA kaj Tomasz CHMIELIK (literaturo de la unua periodo),
- c)** 3-jara postdiploma universitata studado pri interlingvistiko por internacia partoprenantaro (ĉi jare startis la 5a grupo kun 20 partoprenantoj); unusemajna intensa sesio / semestro kaj reta laboro inter la renkontiĝoj, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj: prof. dr hab. Ilona KOUTNY. Info : <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>.

Rusio**Moskva (*) :**

- a)** Eŭropa Jurscienca Universitato Justo, (6-oj Novopodmoskovnij pereulok 6, RU-125130, Moskva)
- b)** Prof. D-ro Gennadij SHILO (10 ul. Krasnoarmejskaja, Sofrino, Moskva, RU-141270 rectorate@ejusto.ru) /P/ - Prof..D-ro Liana TUKHVATULLINA (10 ul. Krasnoarmejskaja, Sofrino, Moskva, RU-141270 admin@ejusto.ru) /P/.
- c)** Deviga intensa kurso, fremdlingvo (krom la angla kaj la latina) por studentoj de ĉiuj fakultatoj en la 1-a jaro; 30 h/sem, s. 60 h.
Kun kompleksa ekzameno (konversacio, distraĵoj – deklamado, kantado ktp., partopreno en 2-hora spektaklo – juĝprocezo en miniaturo) laŭ 5-poenta sistemo.

Tagil (*) :

- a)** Pegagogia Akademio (Sverdlovskaja reg.,N.Tagil-622013, str.Krasnogvardejskaja 57 www.ntspi.ru).
- b)** S-ino Larisa KUZMENKO (Sverdlovskaja reg.,N.Tagil-622013, str. Kushvinskaja 25"A",Rusio. klarisa8@yandex.ru)
- c)** Du grupoj de la 1-a kaj 2-a kursoj en la Fakultato de Aldonaj Profesioj ; 3 h/sem. Post la kursfino estas planitaj ekzameno kaj atestilo de la Fakultato.

Vladivostok (*) :

- a)** For-Orienta Federala Universitato (ul. Puŝkinskaja 10, RU-690950 Vladivostok).
- b)** Asociita prof. Aleksandr B. TITAJEV (oriento@mail.ru, oriento@yahoo.com).
- c)** Por studentoj de la universitato. Fakultativa; 2h/sem., sume 42 h.
Kun studunuo

Slovenio

Ljubljana (*) :

a) Universitato, Fakultato pri Filozofio / Univerza v Ljubljani, Filozofska Fakulteta (Aŝkerĉeva 2, SI-1000 Ljubljana).

b) Ekde febr. ĝis majo. : D-rino Simona KLEMENČIČ (Oddelek za primerjalo in sploŝno jezikoslovje, Filozofska fakulteta, Aŝkerĉeva 2, SI-1000 Ljubljana klemencic.simona@gmail.com) .

c) 2-foje 30 min/sem ; kun ekzameno ; elektebla « bolonja »kurso. Post la fino de la kurso eblas akiri oficialan atestilon – aparta ekzameno.

Pri la kurso :: <http://spj.ff.uni-lj.si/index.php?id=121&L=4> .

Usono

Rochester (New-York) (*) :

a) Universitato / University of Rochester.

b) S-ro Hoss FIROOZNIJA (CPU 271205, University of Rochester, Rochester, NY 14627-1205 - hoss.lodestone.org) /P/.

c) 1.5 h/sem., dum 10 semajnoj.

Sennota enkonduko al la lingvo kaj kulturo. Hejmtasko el diversaj fontoj, inkluzive de la anglalingva lernolibro "Teach Yourself Esperanto".

Info : < <http://esperanto.lodestone.org>>.

.

Stanford (Kalifornio) (*) :

a) Universitato Stanford (PO Box 20089 Stanford, Ca 94309-0089 USA; <http://Esperanto.org/stanford>).


b) S-ro E. WILLIGER (stanford@Esperanto.org).

c) Baza kurso; 2 h/sem. ĉe La Internacia Centro de la Universitato, kaj proponita ĉiujtaga hejmtasko.

Oni rajtas akiri studunuojn de la Universitato, sed nur kun ties permeso kaj malfacile.

==+==+==+==+==+==+==

Disvolviĝo inter 1977 kaj 2012



Laŭ : [landoj-kursoj]

G.Pirlot, *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo* [poŝta kompilado]

1977 : 1-a eld., dec. 1977 [21-58]

1980 : 2-a eld., jan. 1981 [19-51]

1981 : 3-a eld., jan. 1982 [15-56]

1983 : 4-a eld., dec. 1983 [17-79]

1984 : 5-a eld., dec. 1984 [22-109]

1986 : 6-a eld., jun. 1986 [28-125]

1988 : 7-a eld., jun. 1988 [24-107]

1990 : 8-a eld., jun. 1990 [19-91]

1992 : 9-a eld., jun. 1992 [23-90]

G.Pirlot, *Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altinstitutoj* [reta kompilado]

2002 : nov. [20-43]

2004 : febr. [23-63]

2006 : jan. [26-75]

2008 : jan. [24-68]

2010 : jan. [21-56]

2012 : jan. [19-50]



Kursoj sine de universitata asocio

Baotou (Interna Mongolio), Ĉinio (*) :

- a) Scienca kaj Teknika Universitato de Interna Mongolio / Neimengu Keji Daxue (Baotou-shi Aerding Dajie 7-hao, Baotou, CN-014010, Baotou, Neimenggu).
- b) S-ro LIU Baoguo (verdakoro@yahoo.com.cn) - S-ino CHEN Ping.
- c) Libervola kurso por novaj membroj de la E-societo de la universitato.

Dallas (Teksaso), Usono (*) :

- a) Universitato de Teksaso, Dallas / University of Texas, Dallas (UTD) (800 W. Campbell RH 10, Richardson, TX 75080).
- b) Diverslandaj kursgvidantoj : en 2012 (25 junio-4 julio). Baza nivelo: S-ino Birke DOCKHORN (Germanio); meza nivelo : S-ino Tim WESTOVER (Usono); supera nivelo : S-ro Spomenka ŠTIMEC (Kroatio).
- c) 8 intensivaj tagoj: klasoj en la mateno, eksterklasaj aktivoj en la posttagmezo kaj vespero. Ne-oficialaj kursoj de la universitato. Ĉiu studanto ricevos atestilon de NASK / Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursaro <http://esperanto.org/nask> . Kunordiganto : S-ro Ellen M. EDDY (11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 eddyellen@aol.com).

Nanchang (Jiangxi), Ĉinio (°) :

- a) Esperanto-Asocio de Nanchang Universitato / Nanchang Daxue (Nanchang-shi, Honggutan-xinqu, Xuefudadao-99hao, CN-330031).
- b) Prof-ino. GONG Xiaofeng (Nanchang-shi, Honggutan-xinqu, Xuefudadao-99hao, CN-330031 - arko.gong@qq.com) ; s-ro Xiong Hui (magistro).
- c) Postlabora tempo (ekde aprilo 2011).

Universitatoj de la tria aĝo

Esperanto estas instruata ankaŭ en tiel nomataj "universitatoj por la tria aĝo", ekzemple en :

Changsha (Hunan) Ĉinio (°) :

- a) Changsha Komerca kaj Turisma Kolegio/Changsha Shangmaolüyou Zhiye Xueyuan (Changsha-shi Guibailu 16-hao, Changsha, CN-410004, Hunan).
- b) S-ro ZHU Yonghan (85452387@qq.com) /P/.
- c) Nedeviga; 8h/sem; s.144h (por 4 kursoj). Kun ekzameno, 2 studunuoj, premio kaj atestilo.

Lille, Francio (*) :

- a) Universitato pri Libera Tempo, ligita al la Universitatoj de Lille / Université du Temps Libre, 9-11, rue Auguste Angellier, FR-59046 Lille).
- b) S-ro Michel DECHY (65, allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve

d'Ascq - michel_dechy@hotmail.com).

c) Dunivelaj kursoj ; 10 lecionoj po 1h30, kaj prelego pri Esperanto.

Münster, Germanio (*) :

a) Universitato, sekcio pri “universitato de la 3-a aĝo” (Bispinghof 9-14, DE-48143 Münster).

b) D-rino Norma SEITHEL (dr.n.seithel@seithel.de).

c) Vintra semestro 2011/12. Kurso por pliaĝaj komencantoj.

Kun 2 studunuoj.

Nowy Sącz, Pollando (*) :

a) Universitato de la Tria Aĝo (MOK, Aleja Wolności 23, PL-33-300 Nowy Sącz).

b) S-rino Danuta KOWALSKA (ul. Broniewskiego 8 b/7, PL-33-300 Nowy Sącz – vojdan2@rtk.net.pl) - S-rino Jolanta KIERES (ul. Grodzka 11, PL-33-300 Nowy Sącz – jola11k@interia.pl).

c) Tri kursoj; 2 h/sem., s. 60 h. Kun ekzameno kaj atestilo.

Rzeszów, Pollando (*) :

a) Universitato de la Tria Aĝo (ul. Piłsudskiego 21A, PL-35-075 Rzeszów).

b) S-rino Lucyna CHYŁA (ul. Starzyńskiego 1/1, PL-35-508 Rzeszów - lucchy@wp.pl).

c) Elementa kurso; 1 ½ h/sem. , sume 60 h (renkontiĝo ankaŭ dum ferioj).

Sen ekzameno kaj atestilo.

Vladivostok, Rusio (*) :

a) Supera Popola Lernejo ĉe la For-Orienta Federala Universitato por studentoj de la tria aĝo (ul. Puŝkinskaja 10, RU-690950 Vladivostok).

b) Filologo Ludmila ABISOVA (Esperanto-klubo,OIAK, str. Petra Velikogo 4, RU-690090 Vladivostok-90 - oriento@mail.ru, - oriento@yahoo.com) .

c) – Elektebla; 2 h/sem., sume 42 h.

Kun studunuoj.



Akademio Internacia de la Sciencoj

www.ais-sanmarino.org

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino estas la komuna agadpodio de fake elstaraj kaj lingvopolitike progresemaj sciencistoj el la tuta mondo, kiuj celas internacilingve pliefikigi la esploron kaj instruon de ĉiuj sciencoj, kaj pliproksimigi ĉi tiujn al la tekniko kaj arto, per plibonigo de la internacia komunikado kaj de la interfaka kunlaborado.

La Membroj (MdAIS), same kiel la asociitaj, efektivaj membroj (AMdAIS) kaj la adjunktoj (AdAIS) apartenas al diversaj nacioj, kontinentoj, rasoj, religioj, lingvoregionoj kaj politikaj kampoj. La politika pluralismo de la apartenataro garantias la striktan **politikan neŭtralecon de AIS**, krom la komuna strebado al ties ununura politika celo: realigi en la scienca mondo iom post iom la bazan homan rajton je komunikado sen malhelpo ĉu pro lingvobaroj ĉu pro lingvodiskriminacio.

Kvankam la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) laŭ artikolo 4 de sia Konstitucio "zorgas speciale pri la aplikado de la Internacia Lingvo en la scienca komunikado kaj en kulturo", ĝi **nek volas nek povas anstataŭi la Akademion de Esperanto** aŭ ajnan alian organizon de la Esperanto-movado.

Kvankam la ununura **laborlingvo** de la Senato, de la Ĝenerala Asembleo kaj de la ekzamenkomisionoj de AIS **estas ILo**, la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto, la Konstitucio deklaras krome la kvar en la eŭropa scienco plej tradiciirĉajn etnajn lingvojn oficialaj lingvoj de AIS: la italan, francan, germanan kaj anglan lingvojn.

Regule AIS organizas diversajn konferencojn, i.a. « Sanmarinecajn Universitatajn Sesiojn » (SUS), dum kiuj okazas studfinaj ekzamenoj je iu ajn nivelo.

Kontaktadreso : informo.@.ais-sanmarino.org .

Studado pri turismo kaj kulturo en Esperanto **Klerigejo de la Internacia Akademio de la Sciencoj**

Pollando, Bydgoszcz :

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, ekde 1991, laŭleĝe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. (Str. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz

stud.@.esperanto-turismo.org

<http://www.esperanto-turismo.org>).

Kursgvidantoj kaj prelegistoj el diversaj landoj.

Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco - i.a. pri ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, kultur- kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkato, estrado kaj de pluraj lingvoj.

Esperanto-Insulo

En la universitato de **Hajnan, Ĉinio** de la 11a de januaro ĝis la 12a de februaro 2012. Temas pri universitat-nivelaj kursoj por fluparolantaj Esperantistoj ne nur el Ĉinio, sed el la tuta mondo. La celo de la projekto ne estas lerni PRI Esperanto sed lerni PER Esperanto.

Temoj : historio, komputiloj, paco.

Instruistoj :

- Prof. Ron GLOSSOP, Usono : « *Alfronti militon* » ;
- Prof. Federico GOBBO, Italio : « *Filozofio kaj historio de la informadiko* ».

Ĉiu universitata kurso daŭros 40 horojn entute, 2-horojn ĉiutage, de lundo ĝis vendredo, inter la 11a de januaro kaj la 12a de februaro 2012.

Krome, en **Esperanto-Insulo**, okazos du aliaj specoj de kursoj: 1 tre tre intensaj; 2 instruataj. Por pliaj informoj vidu la paĝaron < <http://www.esperanto-insulo.info/> >.

Universitato de Esperanto

La **Universitato de Esperanto** estas nova projekto por starigi universitat-nivelajn kursojn tute en Esperanto. Ĝi baziĝas sur la modeloj de la programoj angle nomataj OPEN de la Universitato de Berkeley (www.webcast.berkeley.edu) kaj de la Universitato de Yale (www.oyc.yale.edu), tiel ke la kursoj estas filmitaj kaj poste senpage disponeblaj ĉe la Interreto. La kursoj estas kompletaj, instruataj de rekonata fakulo kun doktordiplomo kaj universtata instruo-sperto, 40-horaj, sufiĉe ĝeneralaj, filmataj kaj registrataj, kutime jam instruataj en aliaj universitatoj, kaj okazas sub la licenco Kreiva Komunumo. Ili iĝos ĉies propraĵo kaj ili ankaŭ disponeblas por la eventuala kaj libera utiligado de AIS.

Post la fino de tiuj du kursoj dum **Esperanto-Insulo**, nova retejo por la Universitato de Esperanto estos starigita, kaj tie, kiel en la sistemoj de Berkeley kaj de Yale, troviĝos ĉiuj kursomaterialoj por, ke interesataj homoj povos poste studi tiujn kursojn. Provizore, informo pri la **Universitato de Esperanto** lokiĝas en la retejo por **Esperanto-Insulo** ĉe www.esperanto-insulo.info/universitataj.htm . Estas espereble, ke poste Esperantistoj tra la tuta mondo utiligos sian Esperanton por studi temojn kiuj ne rilatas ne nur al la lingvo Esperanto mem, sed ankaŭ al faktemoj. utilaj kaj interesaj.

Kvankam Esperanto-Insulo estas la naskiĝloko de la Universitato de Esperanto, tio tute ne signifas, ke ĝi estos la ununura loko de venontaj kursoj. Kursoj povas stariĝi ie ajn, sed ili devas respekti la bazajn principojn de la **Universitato de Esperanto**. Kursoj, kiuj estas ekster ĝia kadro, certe tamen bonvenos en aliaj strukturoj, aliaj kadroj kiaj tiu de AIS aŭ aliaj.

Dennis KEEFE, Universitato de Nankino, Ĉinio



Postparolo :

Tutkore mi dankas ĉiujn, kiuj afable informis min pri tiuj kursoj kaj eblegis iel ĝisdatigi tiun liston de Esperanto-kursoj.

Mi devas konfesi ke kompiladi tiajn sciigojn ne estas facila tasko ; ne malofte necesas kelkaj rememorigoj antaŭ ol ricevi informojn ! Estis eĉ pli facila tasko, kiam mi faris tion poŝte (1977-1992). Tamen, mi komprenas ke nun, pro modernaj interkomunikiloj, oni ofte naĝas en amaso da retmesaĝoj ...

Tia listo ne estas kompleta – mi bonege konscias pri tio - sed mi esperas ke ĝi povos iel utili, ĉu por ebligi fakajn rilatojn, ĉu por daŭrigi E-kursojn en universitato aŭ altinstituto, ĉu por helpi malfermon de tia kurso aliloke, alilande.

Idealo estus ja ke, en ĉiu lando, arigu kaj daŭre ĝisdatigu tiajn sciigojn, ĉu la landa ILEI-sekciestro, ĉu responsulo de la landa E-asocio. Bedaŭrinde, ofte “idealo” estas sinonimo de “utopio” ! Ĉu ne?

Kiel kutime kiu ajn rajtas uzi ĝin laŭplaĉe, kondiĉe mencii la fonton.

Krome, kiel mi faris ĝis nun, mi diskonigos sciigojn pri aliaj kursoj, kiujn mi ricevos post la dissendo de ĉi-tiu listo.

Esperante ke ĝi povos iel helpi.

Kore via,

Germain PIRLOT

Eblas konsulti tiun liston ĉe :

Edukado Net :

- en la dosierujo : <http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=183>
- en la kursejoj : <http://edukado.net/kursejo>

<http://egalite.hu/listo/listindex.htm>

=====

SCIIGOJ RICEVITAJ POST LA ĜISDATIGO :

11.01.2012 - Japanio

Fukuoka (*) :

a) Kyushu-Universitato/Kyushu Daigaku (6-10-1 Hakozaki, Higasi-ku, JP-812-8581 Fukuoka).

b) Prof. TABATA Yoshiyuki (tabata.@.cc.kyushu-u.ac.jp).

c) Nedevisa, somera intensiva lingvokurso por komencantoj; 4,5 h/tage, 5 tagoj. Pasintoj de la ekzameno ricevas 2 kreditunuojn.

13.01.2012 - Brazilo

Curitiba (Paraná) (*) : [p. 4 en la listo]

a) Federacia Universitato de Paranao (UFPR).

b) Prof. D-ro Ivan Eidt COLLING (iecolling.@.yahoo.com.br) - S-ro Matheus ARTIOLI FIRMINO (kuracisto.@.hotmail.com) – S-ro Thiago MACHADO DA SILVA (thiagomachado86.@.gmail.com).

c) Temas pri kursoj de CELIN (Centro pri Lingvoj kaj Interkulturo - www.celin.ufpr.br), kiu estas programo de por-komunuma agado de la Universitato ("por-komunuma" signifas, ke ĝi celas ne nur la internan universitatan publikon, sed ankaŭ la eksteran). Diversaj E-kursoj ; 30 horoj dum tri semajnoj.

Precizigo de Prof. Ivan COLLING :

Pri "*Diversaj E-kursoj ; 30 horoj dum tri semajnoj*".

Fakte, 30 horoj dum tri semajnoj estas la sistemo de intensaj kursoj, kiujn ni dufoje okazigis (en januaro 2011 kaj en julio 2011). Sed la konstanta disponigo de kursoj estas "dumsemestraj", do 30 horoj laŭlonge de 15 semajnoj (t.e., po du horoj ĉiusemajne).

Niveloj: 1, 2 kaj 3 (por 2012 tre probable ankaŭ 4).

01.02.2012 - Korea Resp.

Seoul (*) :

a) Universitato Kyunghee(Kyunghee Univ., Hoegi-dong, Dongdaemun-gu, Seoul, Korea 130-701), unu klaso.

- b) Doc. LEE Jung-kee (esperanto.@saluton.net) /P/.
c) Libere elektebla; 2 h/sem dum 16 semajnoj
Kun 2 poentoj semestre; kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

07.02.2012 - Ĉeĥio

Brno (*) :

a) Universitato de Masaryk , Filozofia Fakultato, Instituto pri lingvistiko kaj baltistiko (Arna Nováka 1/1, 602 00 Brno).

b) S-ro Josef VOJÁČEK (jvojesp@gmail.com).

c) Devige elektebla inter naŭ studobjektoj por la studentoj de la instituto, elektebla por ceteraj.

Dum 13 semajnoj en la printempa semestro; 2 h/sem. Kun 4 kreditunuoj.

- *Rim. : oni antaŭvidas daŭrigon dum la aŭtuna semestro.*

27.08.2012 – Pollando

Kraków (*) :

a) Jagelona Universitato

b) Maria MAJERCZAK

En junio okazis la pli frue anoncita oficiala 20-hora, internacia, lingvoperfektiga E-kurso de Jagelona Universitato. Ĝi disvolviĝis plene en interreta studejo, ret-ĉeeste, realtempe.

Al la kurso aliĝis esperantistoj el 5 landoj de 3 kontinentoj: Brazilo (3 personoj), Urugvajo, Katalunio, Nederlando kaj Kongolo (Kongo Brazzaville).

Okazis studado laŭ la planita programo. Iuj el la gramatikaj fenomenoj estis studataj laŭ nova aliro. La kurso-rilataj spertoj de la studentoj kaj de la kursogvidintino estas tre bonaj. La studentoj ricevis oficialan konfirmilon de la universitato pri partopreno en la kurso. Kelkaj el ili deziras plulerni E-on en Jagelona Universitato.

Dum la kursa kontakto la partoprenantoj montris grandan intereson pri la kulturoj de la aliaj studentoj kaj pri tiuj mem. Eksterlecione okazis du spontanaj renkontiĝoj pri interesaj detaloj koncernantaj la lingvojn kaj kulturojn de kursanoj. Ili rezultis el la bezono transdonadi al aliaj siajn interesajn informojn. Okazis ankaŭ interŝanĝoj inter personoj kun similaj profesiaj interesoj, t.e., ĉefe pri metodiko kaj organizado de E-instruado.

=====

Pekinaj studentoj finis sian lernadon en esperanta kurso

2013-06-06

la 2-an de Junio 2013 en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato finiĝis la esperanta kurso gvidata de Profesoro Li Weilun. Ĉirkaŭ 50 studentoj trapasis la ekzamenon kaj gajnis 2

poentojn por sia lernado en la universitato. Post la ekzameno iuj studentoj diris, ke ili volas daŭre lerni Esperanton en mezgrada kurso, 8 studentoj el diversaj universitatoj esprimis aliĝi al Pekina Esperanto-Asocio, kaj plenigis la aliĝilon. PEA decidis organizi mezgradan E-kurson en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. Sinjoro Usui Hiroyuki, kiu laboras kiel redaktoro en radakcio de El Popola Ĉinio kiel instruisto gvidos la kurson.

=====